

Eŭropa Bulteno

Marto 2013, Numero 125

KONGRESO DE EEU EN 2014 EN KROATIO

Kiel la legantoj estis informitaj, dum la 9-a kongreso de EEU en Galivo (Irlando) la estraro akceptis la inviton de slovakoj por la sekva kongreso en Nitra. Tamen la organizantoj esprimis la opinion poste ke pli konvenus al ili havi la kongreson en 2016. Pro tio la estraro serĉis alian eblon por la kongreso en la jaro 2014 kaj trovis ĝin en Kroatio. La estraro entuziasme akceptis la inviton de kroata urbo Rijeka situanta ĉe la bordo de Adriatika maro. Des pli plaĉis la ideo ke ni povos okazigi la kongreson en nova EU-lando jam en ties unua jaro de ĝia definitiva akcepto kiel la 28-a membro de EU (ekde la 1-a de julio 2013). La kongreson invitis Esperanto-societo de la urbo Rijeka kaj ties urbestro. La 10-a kongreso de EEU okazos do en tiu mediteranea urbo de la 5-a ĝis la 11-a de julio 2014.

Esperanto-societo de Rijeka estas unu el malmultaj E-societoj, kiu posedas grandan domon (vilaon) apud Rijeka kiun ĝi ludonas al FERIA Junularorganizo de Kroatio kaj ĝi estas uzata kiel Junulargastejo: FERIA Domo Esperanto. Ĝi estas tre malnova societo – pli ol 100-jara kaj pri ĝia historio kun multaj dokumentoj vi povas informiĝi ĉe:

http://www.esperanto.hr/rijecki_kantun.htm

Ĝi jam posedas luksan prospekton ankaŭ en Esperanto, kiun eblas vidi ankaŭ en la reto ĉe:

<http://press.tz-rijeka.hr/PDF/RIJEKA-Eo.pdf>




En la urbo estas multaj hoteloj kaj ankaŭ en apudaj urbetoj, aparte en fama feria urbeto Opatija kiun uzis por siaj feriadoj eĉ la nobeloj de aŭstra imperiestra korto dum la tempo de Aŭstrohungario. El Rijeka eblas viziti multajn turismajn vidindaĵojn ĉu apudmare, ĉu sur proksimaj insuloj, ĉu en montara kontineneta interno aŭ sur la tuj apuda duoninsulo Istrio. Do eŭropaj esperantistoj povos saluti novan membron en EU: Kroation dum sia jubilea kongreso. Tio estas ankaŭ agnosko al la kroata E-movado kiu ankoraŭ estas unu el la plej fortaj eŭropaj movadoj kun dekkvino da societoj, kvincent aktivaj esprantistoj kaj dekmiloj da tiuj kiuj iam lernis Esperanton.

Jen ĉi-sube ankaŭ artikolo kun impresoj pri Rijeka de junulo – esperantisto, kiu ne estas Rijekano sed studas en tiu urbo.

Zlatko Tišljarić

BONVENON AL RIJEKA

Mi loĝas en Rijeka dum preskaŭ du jaroj kaj dum tiuj du jaroj mi havis okazon lerni pri multaj interesaĵoj en Rijeka. Rijeka havas interesan geografikan situon. La urbo esta pli malpli montara urbo apudmara. Estas multaj ŝtuparoj kaj supren-irantaj vojoj, sed ne timu. Pro tiu fakto promenadoj inter loĝkvartaloj estas tre agrablaj kaj unikaj. Dum la tempo de Jugoslavio en Rijeka oni konstruis multajn industriajn objektojn, ĉefe ŝipfarejojn, kaj multaj novaj laboristoj bezonis loĝejojn. Pro tio la loĝkvartaloj en Rijeka estas interesa miksaĵo de grandaj konstruaĵoj kaj naturaĵoj sur montodeklivoj. Multe da industrio ne plu funkcias kaj oni ne plu laboras. Tio signifas ke malpuraĵoj preskaŭ malaperis. Kaj la miksaĵo de naturo, maro kaj bedaŭrinde neproduktiva industrio rezultas per multege da freŝa kaj, mi kuraĝus diri, bongusta aero.




La urbocentro estas fakte malgranda kaj ĝi lokiĝis ĉe la marbordo. Ĝi estas amuza promenadejo tra longa strato kun multaj malnovaj konstruaĵoj konstruitaj en la tempo de Astrohungario, kaj ĉefe de Italio kaj estas trankvila kaj bela.

La karnavalo en februaro estas fierajo de rijekanoj kaj loĝantoj el ĝia ĉirkaŭaĵo. Estas multaj amaso da maskitaj grupoj kaj individuaj fieraj partoprenantoj. La karnavalo daŭras dum kelkaj tagoj kaj ĉiuj partoprenas: infanoj, junuloj kaj maljunuloj.

Laŭ mi plej bela afero, kiun vi povas vidi en Rijeka, estas suneliroj kaj sunsubiroj. Rijeka situas vertikale al ekvatoro kaj tial la suno pasas perfekte de oriento al okcidento. La suno eliras de malantaŭ unu monto kaj transiras dum la tago la horizonton kaj denove ekdormas malantaŭ la montaro. Tamen la fino kaj la komenco de tagoj ne estas la nura belaĵo ĉi tie. Rijeka havas multajn belajn stelplenajn noktojn. Oni povas rigardi la ĉielon ankaŭ en loka astronomia observejo.

Mi ne ŝatus paroli pri turismaj atrakcioj en Rijeka, ni lasu tion por esplori al la venontoj. Grandaj kaj malnovaj preĝejoj kaj multaj aliaj interesaj historiaj kaj kulturaj aferoj kiel teatroj, kinejoj, amuzejoj kompreneble ekzistas.

Parolante pri Rijeka oni ne povas forgesi la apudan urbeton Opatija kiu kun sia longa marpromenejo estas alloga kaj belega ekskurscelo. Aliaj proksimaj urboj kiel Bakar, Kraljevica, Crikvenica kaj kelkaj pliaj estas belegaj etaj mediteraneaj urbetoj kun tre pura maro.



Mi kredas ke vi rimarkas ke teksto preskaŭ finiĝas kaj plej verŝajne vi pensas: kio pri plaĝoj? Jes estas kelkaj, sed pro tio ke Rijeka estas granda havenurbo multe pli belaj kaj puraj plaĝoj ekzistas en proksimaj apudaj urboj, kie vi povas ĝui kroatan varman tempon, bonajn manĝaĵojn, amuzajn homojn kaj kompreneble multajn ĉeplaĝajn plezurojn.

Venu al Rijeka, esploru tiun urban labirinton kun interesa kaj specifa urboplano kaj ĝuu konstante belegan panoramon.

Bojan Tišljar

GRAVA ARANĜO EN VARSOVIO

La 8-an de majo dum la Tago de Eŭropo okazos grava politika Esperanto-evento en la Ambasadro de Eŭropa Komisiono en Varsovio. Partoprenos en ĝi i.a. prof. Jerzy Buzek - la eksprezidanto de EP, prof. Edmund Wittbrodt - la prezidanto de Pola Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton, diplomatoj de Vieŝegrada Grupo i.a. Jozef Reinart kaj diplomato kaj prezidanto de EEU d-ro Seán Ó Riain - de la irlanda Prezidenteco de Konsilio de EU. Kunorganizanto estas Pola Asocio Europo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL).

Stanislaw Rinduch kaj Edward Kozyra

EEU EN SIMPOZIO EN VARSOVIO

Kiel ni jam raportis en antaŭaj EB-oj, la pola EDE sukcesis atingi, ke la pola parlamento fondis Parlamentan grupon subtene al Esperanto. La grupon prezidas senatano Wittbrodt. La grupo decidis organizi la 8-an de majo okaze de la Eŭropa tago simpozion pri Esperanto. Tiun iniciaton la EEU-estraro plene subtenas kaj volas helpi. Do, partoprenos en la simpozio kaj nia prezidanto Seán Ó Riain kaj Jozef Reinart. Jozef forte engaĝiĝis en Slovakio por atingi ke tiu aranĝo havu maksimuman sukceson tiel ke ĝin krom poloj partoprenu oficialaj politikaj reprezentantoj de almenaŭ viŝegradaj landoj (Pollando, Ĉeĥio, Slovakio kaj Hungario). Li sukcesis interesigi gravajn politikistojn de Slovakio kiuj ankaŭ partoprenos. Estus gravege ke la ĉeĥaj kaj hungaraj amikoj same faru en siaj landoj ke la aranĝo atingu konkludojn kiujn subtenos oficialaj reprezentantoj de la kvar landoj. Tia findokumento povus havi esceptan pezon por estonto de Esperanto.

Zlatko Tišljar

KUNSIDO DE LA PROJEKTO LINGVO.INFO





Kiel ni jam raportis en la decembra numero de Eŭropa Bulteno, la projekto lingvo.info startis decembre 2012 per la unua projektkunsido en Bratislava. La 22-an kaj la 23-an de marto okazis ankaŭ la dua projektkunsido en Berlino kiun paroprenis 17 personoj de ĉiuj 9 partneraj organizoj, inter kiuj 10 esperantistoj. Dum la tuttaga kunsidado ni pridiskutis manierojn kiel interese priskribi unuopajn lingvojn, kiujn ni planas prezenti en la nova retejo lingvo.info. Ĝis la sekva kunsido en Poznań komence de julio la teamo planas fini la lingvopriskribojn kaj post la

somero daŭrigi la laboron per aliaj partoj de la planata retejo. La litova varbagentejo Visetas, kiu partneras en la projekto, jam regule publikigas interesaĵojn ĉe la projekta Facebook paĝo <https://www.facebook.com/lingvo.info> kaj espereble nun post la Berlina kunsido ankaŭ aliaj partneroj trovos tempon kunhelpi pri tiu varbolaboro tradukante la publikaĵojn al siaj lingvoj por helpi ke la informoj estu publikigataj pli multlingve ol ĝis nun.

Maja Tišljár

ESPERANTO EN LA CIVITANSOCIA PLATFORMO POR MULTLINGVECO



Vendrede, la 8an de marto okazis en Bruselo, en la kunsido de la Eŭropa Komisiono la unua kunsido de la restarigita „Civitansocia Platformo por Multlingvismo (European Civil Society Platform to Promote Multilingualism). Temas pri konsila organo al Eŭropa Komisiono, kiu konsistas el pluraj tuteŭropaj organizoj, okupiĝantaj ĝenerale pri lingvoj, ilia instruado kaj/aŭ uzado. Kiel

ni jam ofte raportis dum la antaŭaj jaroj la platformo funkciis ekde la jaro 2009 ĝis 2012 kun 29 membroj-organizoj. Inter ili ankaŭ Esperanto trovis sian lokon – Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estas unu el la 29 fondmembroj de la Platformo kaj ĝi ludis gravan rolon dum la unua periodo de la platformo kaj havis fortan influon al la unua oficiala raporto de la platformo. Nun, en la nova periodo, kiam Eŭropa Komisiono decidis daŭrigi la laboron de la platformo, ĝi estis restarigita. En la nova Platformo restis 23 malnovaj membroj kaj la platformo elektis aldone 6 novajn asociitajn membrojn, kiujn rajtis proponi nur la ĝisnunaj membroj. Inter la 6 novaj asociitaj membroj du estis proponitaj de EEU – unuavice E@I (Edukado@Interreto), pro siaj novigaj edukaj projektoj kaj uzado de inform-teknologioj por lingvo-lernado (slovake.eu, lernu.net, deutsch.info, lingvo.info) kaj due AEGEE (Association des Etats

Généraux des Etudiants de l'Europe / European Students' Forum), kiun EEU proponis ĉar Nico Huurman, nuna estrarano de TEJO, estis prezidanto de AEGEE kaj nun nomumita kiel unu el la reprezentantoj ĉe la Platformo. Per tio ĉi do en la platformo momente estos, depende de la kunsido, 4-5 personoj el 3 organizoj, kiuj uzas kaj subtenas Esperanton kaj provas reale subteni multlingvismon en EU. La martan unuan kunsidon de la Platformo, kiun rajtis partopreni ankaŭ la novaj membroj, partoprenis entute kvar Esperantistoj: Seán Ó Riain kaj Maja Tišljár nome de EEU, Peter Baláž nome de E@I kaj Nico Huurman nome de AEGEE.



La unua ĉi-jara kunsido estis fruktodona – oni ĉefe parolis pri la proksima estonto, substrekante kaj prezentante la proponojn pri la nova 7-jara programo por financado de edukaj projektoj „Erasmus por ĉiuj“, sub kiu ankaŭ la lingvoj havos sian lokon kaj pri kies detaloj la Eŭropa Parlamento kaj la Konsilio ankoraŭ diskutas. Aldone estis traktataj roloj de la malformala kaj neformala edukado kiel ŝlosilaj por lingvo-lernado kaj egalaj ebloj por lerni lingvojn ankaŭ por malavantaĝigitaj personoj.

Prezentitaj kaj diskutataj estis ankaŭ labordokumentoj de la komisiono pri lingvaj kompetencoj kiuj baziĝas sur la rezultoj de la unua esploro organizita de EU en lernejoj en 16 lernejoj sistemoj en EU (<http://ec.europa.eu/languages/eslc/>).

Posttagmeze estis aranĝitaj kelkaj laborgrupoj, kiuj traktis 4 malsamajn temojn (programo „Erasmus por ĉiuj“, formala edukado, neformala edukado kaj lingvoj kaj socia inkluziveco). Dum sekvaj monatoj okazos retaj diskutoj kaj daŭrigo de la laboroj de grupoj. Antaŭenigo de Esperanto en tia ĉi platformo (kie iasence ĉiu „batalas“ por siaj interesoj) ne estas facila tasko, tamen certe pli facilos tion fari kun 3 partneroj en la grupo (dum en unua periodo nur EEU reprezentis kaj subtenadis Esperanton).

Sekva kunsido de la platformo okazos la 21an de junio – kaj Esperanto denove ĉeestos. Afero, kiu antaŭ kelkaj jaroj malfacile imageblis. Eble per la zamenhofa „guto post gutto“ ni iam traboros la babelon eŭropan...

Maja Tišljár kaj Peter Baláž

ESTRARKUNSIDO DE EEU EN BRUSELO

Sabate, la 9an de marto okazis en Bruselo, Belgio la unua ĉi-jara estrarkunsido de Eŭropa Esperanto-Unio. Ĉeestis ĝin 4 el 5 estraranoj (Seán Ó Riain, Flory Witdoeck, Nikola Rašić kaj Peter Baláž) kaj projektmanaĝero Maja Tišljár. La kunsido okazis tuj sekvan tagon post la kunsido de la Eŭropa Civitansocia platforo por Multlingvismo, tial ankaŭ pluraj pritraktitaj aferoj rilatis laboron en la platformo kaj ebloj antaŭenigi Esperanton tie.



La estraro traktis plurajn tagorderojn, inter la plej gravaj estis:

1. Ŝanĝo de la kongreslando en 2014: La EEU-Kongreso en la jaro 2014 okazos en la kroata urbo Rijeka. Por omaĝi la eniron de Kroatio al Eŭropa Unio (kio okazos ĉi-julie) EEU-estraro decidis ŝovi la kongreson de Slovakio al Kroatio. En Slovakio la kongreso sekve devos okazi en somero 2016, ĝuste en la tempo, kiam Slovakio prezidos EU.

2. Asembleo de EEU: Ĝi ĉi-jare okazos dum la Univesala Kongreso en Rejkjaviko.

3. lingvo.info: EEU estas ekde decembro kunordiganto de granda dujara EU-projekto „Lingvo.info“, kies celo estas pretigi multlingvan atentokaptan prilingvan paĝaron, kiu estus alloga ĉefe por adoleskuloj kaj „ordinaraj“ homoj – ĉefa strebo estas interesigi ilin pri lingvoj, informi pri ilia valoro, bunteco kaj indeco lerni ilin. Pri la projekto kunlaboras 9 partneroj el diversaj landoj, pluraj el ili rekte esperantaj (ekz. E@I el Slovakio, Studio Gaus el Germanio, UAM en Poznań, Pollando).

4. Civitana platformo: estis diskutita eblo proponi pli vastan lanĉon de la projekto „Springboard“ (Lingvolanĉilo) – EEU provos plani la projekton kaj fari monpeton por ĝi en Viŝegradaj landoj (Ĉeĥio, Hungario, Pollando, Slovakio).

5. Ekonomia Forumo en Krynica, Pollando: diskutita estis la ĉeesto de EEU, kiu jam dum pluraj jaroj reprezentas Esperanton tie. Dum sekvaj tagoj estos elektita la ĉeftemo kaj prelegantoj, pretigitaj informiloj. La partoprenon de Esperanto en tiu ĉi prestiĝa aranĝo subtenas plurajn jarojn finance ankaŭ UEA.

Peter Baláž

V POLOVICI / EN DUONO

fotoekspozicio, liganta Esperanton kun Eŭropa Unio

Inter la 11-a kaj 22-a de februaro 2013 okazis en kulturdomo de la urbo Partizánske, Slovakio (sidejo de E@I) fotoekspozicio, organizita fare de slovakaj Esperantistoj. La ekspozicio prezentis fotojn de la projekto „**La plej altaj montopintoj de la Eŭropa unio**“, kiun elpensis kaj realigas slovakaj Esperantistoj-turistoj. Celo de la projekto, kiu ekis en la jaro 2008 estas supreniri ĉiujn plej altajn montopintojn de ĉiuj EU-landoj. Nun, komence de la jaro 2013 estis atingitaj 14 montoj, do la projekto estas en sia duono – tial ankaŭ la nomo de la ekspozicio havis du-lingvan titolon (V polovici – En duono).

La 11-an de februaro okazis la solena malfermo de la ekspozicio, dum kiu estis al ĉeestintoj ankaŭ prezentita mallonge Esperanto kaj valoroj de EU, kiujn indas flegi kaj plu evoluadi. Ján Vajs, gvidanto de la projekto ankaŭ skize prezentis la landojn, kies montojn oni jam supreniris.



La ekspozicion vidis kelkcent personoj, laŭ la reagoj en la gastolibro ĝi plaĉis kaj pluraj homoj ankaŭ esprimis subtenon al Esperanto kiel taŭga komunikilo por EU. La ekspozicio ĉi-jare ankoraŭ estos prezentita en Ĉeĥio kaj estas planata ankaŭ ĝia prezento en Pollando. En la estonto, kiam la aldonaj (espereble eĉ ĉiuj) montopintoj de EU estos atingitaj, la ekspozicio povos migri eĉ al pli da landoj – ligante Esperanton kun la ideoj de EU kaj prezentante la naturajn belecojn de unuopaj landoj.

Výstava fotografií s geograficko-cestovateľskou tématikou

Autori:

1. Adriana Albertová	7. Iveta Morgešová
2. Peter Baláz	8. Miroslav Papaj
3. Lubomír Fajth	9. Renáta Staňová
4. Peter Chrdle	10. Vladimír Škuta
5. Wolfgang Köller	11. Ján Vajs
6. Mária Minichová	

11.-22.02. 2013, Dom kultúry v Partizánskom
Otvorené: pondelok-piatok, 09:00 - 16:00 h
Kurátor výstavy: Anton Fiala

Jen la priskribo de la projekto, prezentita en la ekspozicio mem:

Bona slovakio estas ĝenerale karakterizata kiel homo manĝanta haluŝkojn kun brindzo kaj kiu minimume unufoje grimpis sur la monton Kriváň. La karakterizo evoluigadis longtempe kaj al ĝi influis multaj okazaĵoj. El historiografio ĉiu bazlernejano scias, ke anoj de la generacio de Ludoviko Štúr, krom gravaj lingvaj kaj literaturaj agoj, estis fakte unuaj slovakaj turistoj. Ili fondis tradicion de naciaj supreniroj al Kriváň. Hodiaŭ Slovakio apartenas al la Eŭropa Unio. Kio karakterizas loĝanton de la Unio? Kiuj estas la plej altaj montoj de unuopaj landoj? Grupo de esperantistoj decidis en la jaro 2008 realigi programon „La plej altaj montopintoj de EU“. Dum 5 jaroj ili ascendis 14 pintojn: Aukštojas (Litovio), Burrigplatz (Luksemburgio), Gaizinkalns (Latvio), Chionistra (Kipro), Kékes (Hungario), Moldoveanu (Rumanio), Pico de Teide (Hispanio), Rysy (Pollando), Signal de Botrange (Belgujo), Snežka (Ĉeĥio), Suur Munamägi (Estonio), Ta Žuta (Malto), Vaalserberg (Nederlando), Zugspitze (Germanio). Krom slovakaj esperantistoj partoprenis la projekton ĝis nun ankaŭ aŭstroj, ĉeĥoj, germanoj kaj litovoj. La

programo estas sukcese plenumata kaj la fotoekspozicio „EN DUONO“ alportas informojn pri ĝi.

Pli da fotoj troveblas en Facebook:

<http://www.facebook.com/media/set/?set=a.332949806806563.57754.100002746396026&type=1>

Peter Baláž

MEMORTAGO JE JULIO BAGHY KAJ TIBOR SEKELJ

„Amo kreas pacon, Paco konservas homecon, Homeco estas plej alta idealismo.”

La Segeda Esperanto-Rondo, la Societo Julio Baghy kaj la Societo Tiboro Sekelj kore invitas vin la 13-an de aprilo 2013 al la memortago de la 122-jara datreveno de la naskiĝo de Julio Baghy kaj la memortago de la 101-jara datreveno de la naskiĝo de Tibor Sekelj.

Detala programo:

10:00 Rigardado de la ekspozicio de Sekelj: libroj kaj la Esperanto-kolektaĵo de la Biblioteko Somogyi.

11:00 Festaj prelegoj:

- Pejtin Attila – Australiaj ŝelobildoj el la kolektaĵo Tibor Sekelj
- Márkus Gábor – Pasintjara UK en Vjetnamio
- Székely Erzsébet – La vidvino de Tibor Sekelj
- Komuna memoro je Julio Baghy

13:00 Tagmanĝo en iu fama proksima restoracio

Rondotabla parolado de la Societo Julio Baghy kaj la Societo Tibor Sekelj

Memoroj, kantoj, poemoj, filmetoj, prelegetoj per projekciloj

15:30 Florkloronado ĉe la naskiĝdomo Baghy en la strato Ŝohordo (en la angulo de la strato Teleki kaj Sôhordó)

Erzsébet Sekelj, Ildiko Ferenczi kaj Jozefo Baksa

ENKETA KOMISIONO EN LA NACIA ASEMBLEO PRI LA LINGVAJ MISUZOJ AKTUALAJ EN FRANCUJO

La 4-an de februaro 2012, registriĝis ĉe la Prezidejo de la (franca) Nacia Asembleo propono de rezolucio celanta kreon de enketa komisiono pri la lingvaj misuzoj aktualaj en Francujo, taskata proponi agojn por la defendo kaj promocio de la franca lingvo; prezenitaj de Gesinjoroj Jean-Jacques CANDELIER, Patrice CARVALHO, Gaby CHARROUX, André CHASSAIGNE, Marc DOLEZ kaj Jacqueline FRAYSSE, deputitoj. ([legi france](#))

Gazetara komuniko:

La franca sekcio de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto bonvenigas la rezoluciproponon por krei enketkomisionon pri aktualaj lingvaj misuzoj en Francujo. La membroŝtatoj de la EU ankoraŭ ne konsciiĝis pri la ekonomiaj, kulturaj kaj sociaj problemoj rilate al la determino de la publika politiko pri fremdaj lingvoj. La ne-interveno kaj la manko de debato pri la temo kondukas al malegalecoj en la kultura industrio kaj al enormaj investoj en la vivlonga edukado, kiuj garantias nek la konservon de la lingvoj de EU, nek la kreon de eŭropa publika spaco malfermita al ĉiu civitano. La movado Eŭropo Demokratio Esperanto esperas ke tiu ĉi rezoluciprojekto sukcesos kaj ke la registara agado en la lingva areo estas moviĝas al pli bona kontrolo de la elspezoj kaŭzita de la "ĉio-por-la-angla" politiko kaj al pli granda respekto de la civitanoj kaj de iliaj lingvoj.

Kontakto:

Pierre Dieumegard

Sekretario de Eŭropo Demokratio Esperanto, franca sekcio

pierre.dieumegard@free.fr

Emmanuel Debanne

Prezidanto de Eŭropo Demokratio Esperanto, franca sekcio

MINISTRINO PRI EDUKADO DE MALSUPRA SAKSIO EN HAERBERG/HARZ



La nova ministrino por edukaj aferoj, sinjorino Frauke HEILIGENSTADT de la germana federacia lando Malsupra Saksio (Niedersachsen) vizitis Herzberg okaze de la Internacia Tago de Virinoj. Granda festkunveno estis organizita en hotelo "Englischer Hof" kun kulturprogramoj kaj prelegoj.

Ankaŭ AGEI kaj Germana Esperanto-Centro estis reprezentitaj: min akompanis Ewa Kukielka kun

filino Estera.

Dum la matenmanĝo ni havis apartan paroladon kun la ministrino: mi informis ŝin pri Esperanto, pri instruado de Esperanto en herzbergaj lernejoj kaj pri la 46a ILEI-konferenco (<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>), la ĉi-jara plej granda evento en Herzberg/Sieber. Mi kun la sekretariino de urbestro Walter, s-ino Angelika Kiep invitis la ministrinon al la konferenco, transdonis al ŝi informmaterialojn pri Esperanto kaj pri la Esperanto-urbo, pri ILEI kaj pri la konferenco, krome specimenajn numerojn de IPR kaj Juna Amiko.

Ŝi kun granda interesiĝo aŭskultis la informojn kaj kun danko transprenis la broŝurojn, gazetojn. Estis agrabla renkontiĝo.

Zsofia Korody

SCIENCA KAJ TEKNIKA ESPERANTO-BIBLIOTEKO STEB



Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La uzado en sciencaj kaj profesiaj kampoj tamen postulas – krom la entuziasmo – ankaŭ termin-arojn kaj fakajn esprimojn.

Antaŭ ol verki iun ajn sciencan aŭ fakan artikolon oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj. Nia Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB intencas helpi ĝuste en tiu tereno.

Por koncentri la fortojn, en STEB ni deponas verkojn ĉefe el sfero de teknikaj sciencoj, kies produktado estas pli komplika pro la kunligitaj teknikaj

ilustraĵoj, figuroj, tabeloj ktp.

Grandan parton de la biblioteka enhavo prizorgis kunlaborantoj de la Esperanto-Centro Eventoj (Szilvási László, Mészáros István, Vári Csilla, Axel Ország-Krysz, k.a), kiuj ekde la jaro 2000 retajpis aŭ skanis kaj provlegis plurcentojn de malnovaj, ne plu haveblaj libroj, revuoj, artikoloj. Grandan dankon ankaŭ al ĉiuj entuziasmaj eksteraj helpantoj, kunlaborintoj!

Ni invitas ankaŭ vin kunlabori! Kun sincera danko ni akceptas vian kunlaboron ĉu per pretaj materialoj, ĉu per informo pri ilia trov-loko, aŭ per ajna alia maniero.

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB estas trovebla cxe:

<http://www.eventoj.hu/steb/>

L.S. / Ret-Info

MUZIKA FESTIVALO FESTO 2013 AŬGUSTE EN FRANCIO

Mi invitas vin partopreni la muzikfestivalon FESTO 2013 kiu okazos de la 10a ĝis la 18a de aŭgusto 2013 en la Amikejo, tiu tiama esperanto-ŝtato kiu ekzistis inter Belgio, Germanio kaj Nederlando. Preskŭ 100 jarojn poste, ni revenas tien por granda semajno de plej diversaj muzikoj en Esperanto!

La programo konsistos el promenadoj tra la ĉirkaŭaj montetoj, prelegoj pri diversaj temoj, kaj artaj aktivaĵoj dum la tago. Se vi estas muzikisto, nepre kunportu vian muzikilon. Ĉeestos ankaŭ instruisto de gitaro por tiuj kiuj volas lerni tiun mirindan muzikilon.

La nokta programo konsistos el koncertoj, ludoj, kaj bona tempo kune. La koncertoj satigos ĉiujn gustojn de muziko: repo ĝis roko, popo ĝis elektro: ni forgesos nenion. Post la koncertoj venos D kaj MC el la tuta mondo por danci la diskotekon ĝis la noktfin'. Pli kvietaj homoj ankaŭ povos ĝui mirindajn kaj senfinajn ludadojn de la homlupo, teumi en la gufujo, bierumi en la trinkejo... Ni ankaŭ ekskursos al Lieĝo, Matriĥto kaj Akeno.

La renkontiĝo estas malfermita al ĉiuj, kiuj sentas sin junaj en la koro, kaj kiuj pretas ĝui

muzikon, amikecon, ĝojon kaj Esperanton! La gastigado okazos en tre moderna junulara domo kun tuta moderneco kaj komforto. Eblos ankaŭ tendumi aŭ loĝi en luksa gastejo. Se vi volas scii pli pri tiu renkontiĝo, legu la retpaĝon <http://festo.jefo.fr> kaj aliĝu plej rapide! Ni ankaŭ starigos karavanojn kiuj portos vin de IJS de aliaj urboj de Germanio ĝis FESTO, kaj reen! Pli da informoj pri tiu karavano: <http://alesk.eu/karavano/karavanoj-al-festo-2013/> Mi petas ĉiujn plusendi ĉi tiun informon al ĉiuj lokaj, urbaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj dissendlistoj!

Alekĉjo, prezidento de Junulara Esperantista Franca Organizo

ALJUĜO DE PREMIO CIGNO 2013

La Estraro de Fondaĵo Cigno decidis aljuĝi Premion 'Cigno' 2013 al Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA). La Asocio en la daŭro de la jaro 2012 konstante rilatis al la amaskomunikiloj en Ĉeĥio kaj sukcesis aperigi grandan nombron de artikoloj ne nur en ĵurnaloj, televido kaj radio, sed ankaŭ en fakaj revuoj, per prelegoj kaj kulturaj aranĝoj. Pozitive surprizis la estraranon de Fondaĵo Cigno, ke ĈEA raportis pri 'nur' 200 elpaŝoj, kiujn ili povis dokumenti kaj kiuj reprezentas nur 80% el la tuta tutjara agado. Tio montras mirinde vastan laboron en la informa kampo.

Ĉi-jare elekti nur unu premiiton estis malfacila tasko, ĉar la 6 landaj asocioj partoprenantaj montris elstaran laboron kaj fortan klopodon konigi nian lingvon kaj Movadon al la neesperantistoj. La Cigno-Estraro instigas la landajn asociojn daŭre prioritati la informan agadon ankaŭ en la jaro 2013.

Fondaĵo Cigno estis starigita en decembro 2011 por premii la agadon de landa asocio ene de Eŭropa Unio, kiu plej bone informis la eksteran publikon pri Esperanto dum la periodo de unu jaro.

Ayako Kawakita - Prezidanto

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de marto 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Bojan Tišljarić, Petro Baláž, Maja Tišljarić, Stanislaw Rinduch, Edward Kozyra, Elizabeto Sekelj, Pierre Dieumegard, Alekĉjo, Zsafia Korody, Laszlo Szilvasi, Ayako Kawakita.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

